REVUE FRANÇAISE D'ESPERANTO

FRANCA ESPERANTISTO

Fondée en 1908 — 37e année — 3e série — N° 260 — Novembre - Décembre 1969

97

alpha encyclopédie

mercredi 24 septembre 1969 - 2,90 F - 2,60 FS - 30 FB

la grande encyclopédie universelle en couleurs

ESPÉRANTO

... Dès ses origines, il s'agissait d'une langue littéraire et Zamenhof a voulu traduire en espéranto les chefs-d'œuvre des littératures nationales. Mais, très vite, il s'est créé une littérature originale, directement écrite en espéranto. Il importe de remarquer ici que l'on confond trop souvent artificialité, régularité et pauvreté. L'espéranto est à l'origine une langue *artificielle*, mais il faut reconnaître que Zamenhof a su lui donner les propriétés internes qui lui ont permis de ne pas rester une simple algèbre instrumentale. Il est indéniable que c'est une langue vivante, à laquelle se poseront les problèmes sociologiques de toute langue, pour peu que la communauté des espérantophones continue de croître. Mais ces problèmes ne se poseront jamais avec acuité si les espérantistes conservent à la langue son caractère de *helplingvo* (langue auxiliaire), capable de belles créations littéraires, mais surtout destinée à être une langue véhiculaire neutre et supranationale, hors de toute hégémonie culturelle et de tout impérialisme linguistique...

... Une académie est chargée d'accepter ou rejeter les néologismes suggérés.

L'espéranto est actuellement en mesure de rendre les services que l'on peut attendre d'une langue dans les relations entre tous les pays du monde et dans tous les domaines : littéraire, scientifique, artistique, philosophique, politique, touristique, industriel, commercial, juridique. Près de 30 000 ouvrages ont été édités, dont un grand dictionnaire illustré, 112 dictionnaires et lexiques spécialisés, et des dictionnaires bilingues pour chaque pays. La presse en espéranto comprend près d'une centaine de périodiques ; 35 maisons d'édition diffusent la littérature ; 18 stations de radio et de télévision assurent des émissions régulières dans cette langue.

L'espéranto est enseigné dans divers établissements publics ou privés (écoles primaires, collèges, lycées, facultés), dans les cours organisés par les clubs espérantistes de nombreuses villes, au moyen de cours par correspondance, de disques et par la radio.

L'idéologie pacifiste de l'espérantisme a valu à ce mouvement d'être persécuté dans certains pays totalitaires, en particulier par les organisations d'inspiration fasciste. De même, le scepticisme freine l'essor de l'enseignement de l'espéranto.

Chaque année, depuis 1905, des congrès internationaux réunissent plusieurs milliers d'espérantistes de tous les pays. Des congrès régionaux et nationaux, rassemblant les représentants d'une même profession par exemple, ont aussi lieu régulièrement. La diffusion mondiale et l'utilisation de la langue sont assurées par de grandes associations internationales.

FRANCA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO DE U.F.E. (Unuiĝo Franca por Esperanto)
34, Rue de Chabrol, Paris X - C.C.P. 855-35 Paris
ABONNEMENT ANNUEL : **30 Francs.** — Le Numéro : **3 Francs** (CCP 855-35 PARIS)

Rédaction provisoire :
J.-A. ROUSSEAU
U.F.E., 34, rue de Chabrol
PARIS (10e)

—

Les textes à publier doivent être toujours dactylographiés avec double marge et double interligne.

—

Prière d'envoyer des clichés et non de simples photographies.

—

Les manuscrits non insérés ne sont pas renvoyés.

—

Joindre 0,80 F. en timbres pour tout changement d'adresse.

—

BUREAU DE L'U.F.E. :

Président :

Dr André ALBAULT, 32, av. E.-Billières, 31 - TOULOUSE - 03.

Vice-présidents :

Gabriel ROUGETET (Relations extérieures, statuts), 71 ter, avenue Foch, 78 - SAINT-GERMAIN-EN-LAYE.

THIERRY Jean (affaires culturelles, enseignement extra scolaire), 5, rue Léon-Cogniet, 75 - PARIS-17e.

J. GUILLAUME (relations avec l'U.E.A., secrétariat administratif), 8, rue Camille-Saulnier, 78 - Le VÉSINET.

F. BOYET (G.E.E., enseignement dans les écoles), 3, rue Lebas, 49 - ANGERS.

Secrétaire Général :

André BOURDEAUX (affaires générales, information, relations avec la presse, Espéranto-Actualités), chez U.F.E. 34, rue de Chabrol PARIS 10e

Secrétaire général adjoint :

Mme BALLAVEN (affaires générales), 18, avenue de Villiers, 75 - PARIS (17e)

Secrétaire chargé des finances :

Pierre ROYER, Estérel n° 2 ; 49 rue de Chatenay ; 92 - ANTONY

Trésorier :

J.A. ROUSSEAU, 64, avenue J.-Moulin, 75 - PARIS (14e).

C O T I S A T I O N S

U. F. E.

Membre Adhérent	6,-
Membre Titulaire	30,-
Membre Titulaire Junior (- de 21 ans).	15,-
Membre Donateur	45,-
Membre Bienfaiteur	75,-
Membre Titulaire à vie	600,-
Membre Donateur à vie	900,-
Membre Bienfaiteur à vie	1500,-

U. E. A.

Membro-Jarlibro	23,00
Membro-Abonanto (MA/MA.K.)	46,00
Membro-Subtenanto (MS)	69,00
Juna Membro-Jarlibro (JMJ)(ĝis 21 j.).	11,50
Juna Membro-Abonanto (JMA)	34,50
Dumviva membro (DM)	920,00

<u>UN EVENEMENT....</u> Pour la première fois dans l'histoire de l' édition française une encyclopédie publie un article complet et objectif sur l'Espéranto. Il s'agit d'ALPHA-Encyclopédie qui, sous la plume de M. CULIOLI, éminent angliciste(Institut Britannique de la Sorbonne) a rédigé un article très documenté dont nos lecteurs ont pu lire un extrait en couverture de la Revue. Voilà qui nous change des élucubrations de certains linguistes ou prétendus tels dans certains dictionnaires ou ouvrages collectifs.

Nous tenons ici à remercier très vivement notre ami BOURDELON,président du groupe de Marseille dont l'intervention personnelle a été décisive et qui nous a permis de fournir à M. CULIOLI une documentation abondante, rigoureuse et précise.

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

La Monda-Lingvo-Problemo: <u>nova prezo: 39,00 Fr.</u>

KOTIZOJ - Ni denove memorigas, ke la kotizoj oni pagu nur pere de la lokaj aŭ federaciaj kasistoj. Pro tio, ni indikas ĉi poste la titolojn kaj numerojn de la poŝtkontoj uzotaj:

BURGONJA FEDERACIO: M-lle M. LEPINTE - DIJON 484 - 40

CENTRA MONTARA FEDERACIO: M-lle HUETER - CLERMONT-FERRAND 293 - 87

CENTRO-OKCIDENTA FEDERACIO: Fédération Centre-Ouest des Centres Culturels Esperanto - NANTES 3000 - 79 - Y

LANGDEVOKO-RUSILJONA FEDERACIO: Fédération d'Espéranto Languedoc-Roussillon - MONTPELLIER 956 - 28

NORDA FEDERACIO: Fédération Espérantiste du Nord de la France LILLE - 517 - 15

ORIENTA FEDERACIO: M. J. CHAPELLIER - NANCY - 399 - 75

PARIZA FEDERACIO: Fédération Parisienne Esperanto - PARIS 10.482.04

PROVENCA FEDERACIO: Fédération Provençale des Centres Culturels d'Espéranto - MARSEILLE - 4.157.40

RODANA ALPA FEDERACIO: Fédération Espérantiste Rhône-Alpes - LYON 451-10

SUD-OKCIDENTA FEDERACIO: M. P. LAURENT - BORDEAUX - 1.214.74

NORMANDA FEDERACIO: Fédération Normande des Centres Culturels Espéranto ROUEN -2.348.06.Z

SUDFRANCIA-PIRENEA FEDERACIO: Fédération Midi-Pyrénées pour l'Espéranto: TOULOUSE - 312 - 64

JUNULARA ESPERANTISTA FRANCA ORGANIZO (JEFO): M. GROSSMANN - STRASBOURG-1.513.72

STUDENTA FRANCA ESPERANTISTA LIGO (SFELO): M. J.-P. LAURENTI

GROUPE DES ESPERANTISTES DE L'ENSEIGNEMENT: G.E.E. TOULOUSE 1.018.02

Por la membroj ĝis 25 jaroj, estas NEPRE necese indiki la naskiĝdaton.

MENDOJ DE LIBROJ - Je la mendo de noveldonitaj libroj, ni petas niajn membrojn indiki la fonton, kio faciligas la laboron de la sekretariato.

ESPERANTO-ACTUALITES - Ne atendu la lastan momenton por antaŭmendi la sufiĉan kvanton de la speciala numero aperonta en Januaro 1970.

SCIENCA REVUO - Eldono de Internacia Scienca Asocio Esperantista, trimonata 72 paĝoj, 14 x 20, n°3/4 Vol. 19a. Abono: 10 F.

Konkordanco de la "Predikanto" (Haupenthal, Germanujo): Inventario de la vortprovizo el la "Predikanto", kun diverĝoj de la Londona Biblio.

Morfologia klasifo de vortoj (F.G.Blasquez, Venezuelo): La klasifpovo sin apogas ekskluzive sur la sintaksa funkcio de la vortoj.

Problemo pri internacia lingvo (B. Popoviĉ, Jugoslavujo): Raporto pri la lasta internacia ĉiujara seminario "UNIVERSITATO HODIAU" pri diroj de Prof. Hamming (Ned.), Peters (Usono=) kaj Popoviĉ (Jugoslavujo).

Nia Geografia Terminaro (A. ALBAULT, Francujo): Temas pri la bela mondmapo eldonita de Instituto por Oficialigo de Esperanto, pri 850 nomoj de fizika kaj politika geografioj. La aŭtoro kritikas la preskaŭ tutan forigon de la divido-streketoj, forigo kiu igas formojn malfacile rekoneblaj: Sanfrancisko, Fortlamio, Novzelando, Riodoro, Daresalamo ktp... kaj kelkajn nekonsekvencojn en apliko de bonaj memdonitaj principoj: 1°) la geografiaj nomoj estu skribataj ekskluzive per la literoj de la esperanta alfabeto; 2°) ili estu esperantigitaj kaj ne nur transskribitaj; 3°) ĉiu objekto havu nur unu nomon; 4°) du objektoj ne havu saman nomon; 5°) laŭeble nomo ne estu konfuzebla kun alia vorto.

Nova ungo-malsano kaŭzita de la vibroj (Dr. KULCSAR, Hungarujo) : Priskribon de la malsano, kun fotoj, faras la aŭtoro, membro de la Komitato de Prizorga Instituto (Peĉs)kaj diagnozas ĝin degenerativa.

Nocio kaj vortsignifo (E. WERNER, Aŭstrujo): Per 16- paĝa traktaĵo, la aŭtoro provas ĝisfunde analizi kaj karakterizi kiujn nociojn entenas la subjekta kompreno kaj la objekta komprenaĵo.

Internaciaj pagoj kaj Oro (SONNENFELD, Urugvajo): Monvaloro devas esti stabila: oro pro tio ne taŭgas. La aŭtoro proponas establi la valoron de la mono mezurante la valoron de la ĉefaj interŝanĝaj internaciaj varoj: 1°)nutraĵoj (tritiko, rizo, sukero, oleo, ktp....); 2°) krudmaterialoj kaj duonproduktoj (petrolo, kotono, fero, ktp....): tiam mono ne submetiĝus al finproduktoj, kiuj elmodiĝas aŭ kies produktebleco grandskale kaj subite multiĝas.

Partaj ŝarĝoj kaj redoksa karakterizaĵo de atomoj en halogenmetanoj (B.V. Tokarev, Sovetunio): Studo pri reduktiga-oksidiga karakterizaĵo de atomoj en organikaj kombinaĵoj (ankaŭ aplikeblaj al neorganikaj kombinaĵoj), kun du tabeloj.

...kaj rubriko de TERMINOLOGIA CENTRO ISAE.

KEMIO INTERNACIA - Vol. 4-a, n° la, 80 paĝoj 16 x 22 Kvarmonata - Jarabono: 11,50 F.

La kursoj CBA kaj CHEMS (J.PODE, Anglujo): ĝis nun la prikemikursoj estis pleje priskribaj. kaj la laboratoria laboro montris, kion la lernanto jam antaŭe konis. Ambaŭ kursoj CBA (Chemical Bond Approach)(kemiligiĝa studmetodo) kaj CHEMS (Chemical Education Material Study:kemiinstruada material-studo) celas lernigi la kemion pere de la laboratoria laboro sammaniere kiel la scienco mem nature progresas; tiuj metodoj aktivaj metas la lernanton en la spiritstato de scienca serĉanto: la bazaj pripensoj estas: pri kiuj problemoj oni povas eksperimenti, serĉi solvon,

kiaj donatoj estas necesaj,kiom da observoj oni povos "kvantigi", kiel tion ordigi plej bone por interpretado. En ambaù metodoj,oni studas naù fundamentajn objektojn : stekiometrio, atomeco, teorio de molekula kinetiko, periodeco, energio, reakcia rapideco, ekvilibro, ligiĝo, acidoj kaj bazoj. La CBA rezultas ĉefe de la pripensado de Dr L. E. STRONG; ĝi celas komprenigi, ke la scienco estas enketa procezo, kiu daùre rilatigas eksperimentajn faktojn kun la aetefaritaj mensaj modeloj necese konstruitaj de la homo pri ili (Kp "La scienco kaj la hipotezo" de H. Poincaré). Tiel estas kemio paŝon post paŝo akirita. CHEMS estas proponita de ambaù Profesoroj G.C. PIMENTEL kaj J.A.CAMPBELL. Kontraùe al CBA, la unuaj ĉapitroj estas panorama sekcio,la sekvo, konsekvence, estos multe pli facile deduktebla, sed pro tio mem, la laboratoriaj eksperimentoj ne estas tiel nepraj, kaj oni devas tre precize kontroli, ĉu la lernanto vere faras ilin. CHEMS, kun klara eksponado, estas plifortigita per bonegaj filmoj. Ambaù kursoj, per malsamaj metodoj tute renoviĝas la kemio-instruadon al duagradaj lernantoj.

Termodinamiko kaj energiaj manifestacioj en la kemiaj reakcioj (J.GONZALEZ, ĉilio): la aùtoro montra kiel, pere de nocioj kiel "interna energio", "entropio","entalpio", "libera entalpio", oni povas prognozi, ĉu reakcio okazos aù ne sub difinitaj kondiĉoj,kaj se jes je kioma rapideco. La aùtoro iras al entropio laù moderna skolo, per kalkuloj de probableco.

La aplikado de altaj premoj en la kemia tekniko (B.TIMM, Germanujo) : D-ro TIMM , prezidanto de la estra-konsilantaro de BASF montras kiel, en industria kemio, en plej multaj kazoj, la altpremaj procedoj estas avantaĝaj, sed ĝenerale je limigo de 300 baroj, (sintezo de amoniako, de dioktilftalato, de butiraldehido, de butanolo, de propionatacido, de metilformiato, de akrilatacido, de metanolo, oksigo de propileno). Je homvido, la tre altaj premoj, 7000 baroj aù pli estos tre interesaj studobjektoj por Institutoj aù Universitatoj, sed ne havos ekonomian signifon por la kemiproduktado.

La modernaj aparatoj por produktado de oksigeno k a j nitrogeno per aerdistilado (B. ROLET, Francujo):
En tiu lasta parto, la aùtoro, grandpaŝe, prikonsideras kelkajn aparat-familiojn kreitajn por respondi al specialaj demandoj, kiel: nure likva O_2-produktado, gasa produktado sub granda premo, kunigo de frakciigo kun pernitrogena lavado.... Konklude al tiu studo, li substrekas la neceson por la estontaj klientoj, pro la nun jupligrandigo de la instalaĵoj la despli grandaj financaj riskoj, akiri sufiĉan scion pri la teknologio de aer-frakciigo, se nur por ĝuste elmeti sian problemon antaù la konstruistaj fakuloj, kaj por forigi ĉian miskomprenon, ofte tre malprofitigan.

°°°°
°°

INTERNACIA JURA REVUO - III/6 - Jarabono: 15 F. - Evoluo de la jura sistemo en Hungarujo (D-ro L. Marton); La ŝtataneco en la juro de Norvegujo (T.A.HAEG); La ŝtataneco en la juro de Pollando (J. PRUSZYNSKI); La internacia reĝimo de Antarkto (R.R. HARRY); Justicordo en G.D.R. (E. GRUHLE); Kondamno al pago por la bono de la ŝtato (D-ro L. GASPARDY) Rajto de la Inventisto (J. SNEYDER).

(Tiu rubriko aperas sub la redakto de Jacques MANCEAU).

xxxoxxxoxxxoxxxoxxxoxxxoxxxoxxxoxxxoxxxoxxxoxxxoxxxoxxxoxxxoxxxoxxx

Por viaj kursoj: ESPERANTO-MANUEL (Chavet-Warnier) - 8 F. ĉe U.F.E. - - - -

...G.E.E..LA LINGVO ESPERANTO EN LA 25-a INTERNACIA KONGRESO DE MODERNA EDUKADO...G.E.E..

(Freinet-pedagogio)

Dum tiu kongreso, organizita en Grenoble (1-5-IV-1969), la esperantistoj gvidataj de LENTAIGNE ne povis manifestiĝi tiom, kiom la pasintajn jarojn, pro la nova kongresorganizaĵo limiganta la nombron de la kongresontoj. Plej grave, ili ne sukcesis akiri, por ilia eks erlanda gasto, la permeson ĉeesti la kongreson! Tamen,ĉi-jare tiu ĉi estis ERBETTA kreinto de "Grajnoj en Vento"!

Rilate la kutiman ekspozicion, alvenis ege malfrue la permeso prezenti ĝin. Nur kelkajn horojn antaŭ la kongresmalfermo, la lokaj esperantistoj rajtis eniri la ĉambron kies duonon ili disponis. Restis tre malmulta tempo por fari tion, kio ne estis farebla antaŭe (ĉar ĝi dependis de la utiligebla spaco laŭ ties formo kaj dimensioj)tio estas la grandliteraj subskriboj:

la temo: " ESPERANTO JE LA SERVO DE MODERNA EDUKADO"

la ekzergo: "FUNDAMENTA TEKNIKO DE LA FREINET-PEDAGOGIO ESTAS LA INTERLERNEJA KORESPONDADO. TIES RETON ESPERANTO EBLIGAS DISVASTIGI SUR LA TUTA MONDO"

la ĉapitro-titoloj: A- Korespondado B-Grajnoj en Vento - C - Vojaĝoj D-Esperanto - E-Kiel lerni Esper - anton - F - Alvoko

Tamen la gravaĵoj estis tie; pendantaj ĉe la muro; la klarigaj tabuloj; sube, elmontritaj sur tablovicoj: la dokumentoj, la albumoj, la libroj. Kaj la tro malmultaj kongresanoj sufiĉe scivolemaj por surgrimpi la trian etaĝon, kun la celo viziti la ekspozicion, taksis ĝin interesa kaj bele prezentita.

Ni rapide trarigardu ĝin.

A-KORESPONDADOJ - La unua tabulo memorigas interesegan provon, kiun faris (antaŭ 38 j. vilaĝa lernantaro uzanta la Freinet-teknikojn. Ĉar la instruisto scipovis Esperanton liaj gelernantoj korespondis ne nur kun francaj lernejanoj, sed ankaŭ kaj samtempe, kun alilandaj geknaboj el ok diversaj nacioj, pere de sia presita lerneja gazeto, kiu tiele, akiris internacian legantaron!

Notinda rezulto: La lernejestro de MUIDERBEGR (Nederlando) entuziasmigita, post kelkaj jaroj, enkondukis en sian lernejon unu presejon kaj la Freinet-teknikojn. Ekzemplero de la muiderberga lerneja gazeto montriĝas ĉe la muro.

Sube, sur tablo, inter dokumentoj ricevitaj kaj kunordigitaj en albumo, tiuj akiris emociigan kaj retrospektivan intereson, kiuj venis el SOVETUNIO,unuope de Baturovo. el kolkoza lernejo en SIBERIO!

La dua tabulo raportas alian provon tre freŝdatan de niaj gekolegoj FORT (Fontaineles-grès), kies gelernantoj, post unujara korespondado, gastigis siajn danajn korespondantojn antaŭ ol reciproke gasti ĉe ili, en Kopenhago (vidu RFE.n°257).

La tria tabulo konsistas el dokumentoj senditaj de LENTAIGNE. El la impona amaso de ĉio, kion liaj gelernantoj en BAZARUC (34) ricevis el tre diversaj lokoj en la mondo, li elektis tiujn, kiuj venis de JAPANUJO: leteroj, etaj objektoj, pentraĵoj , konsistigantaj albumon, kies plej bela ero ĝojigas la tutan ekspozicion. LENTAIGNE sendis ankaŭ la "frukton" de tiu korespondado: Por japanaj infanoj, Lernolibro pri Francujo konsistanta el tekstoj ĉerpitaj en francaj lernejaj gazetoj, unue tradukitaj en Esperanto dare de LENTAIGNE, poste.. en japanan lingvon fare de lia korespondanto. Ekzemplero de tiu neordinara libro,bele ilustrita, montriĝas okulfrape sur fotaĵo de la aŭtoro gastanta ĉe Lentaigne, kaj gazetartikolo rilatanta la eventon.

B - "GRAJNOJ EN VENTO" (G.E.V.) - ĝi okupas gravan lokon. Du tabuloj memorigas ĝian kreadon. En 1956 ERBETTA, nia svisa kolego, instruisto en Bienne, alvokas la esperantistajn edukistojn en la tuta mondo. Li intencas "rilatigi la lernantarojn kaj la pedagogojn, kies idealo estas "socia justeco inter la homoj",Paco inter la popoloj, Egaleco inter la rasoj, Tolero kaj bonvolo al la homoj malsame opiniantaj". Li proponas , eldoni, per kooperado, internacian lernejan gazeton en Esperanto, konsistantan el verkoj (tekstoj kaj desegnaĵoj) de infanoj - ĉiulandaj.

GRANIER

(daŭrigota)

RICHARD LEVIN

La 13-an de septembro, mortis post mallonga malsano Richard LEVIN, honora prezidanto de la Lyon'a Grupo.

Richard Levin esperantiĝis dum sia juneco, kaj jam en 1922 (dum sia militservo), li tradukis la "Nobelan Burĝon" de Molière, kiun la Lyon'a Universitata Esperanto Klubo eldonis en 1936. Dank'al lia longjara ofico en la Foire de Lyon, la loka grupo povis malfermi budon en tiu foiro, kiu havis grandan sukceson, kaj per kiu centoj da novaj interesitoj estis varbitaj.

En 1945, li eldonis la "Nouveau cours d'Espéranto" en 16 lecionoj, kaj mem gvidis multajn kursojn ĉiugradajn, eĉ per radio.

Richard Levin estis rimarkinde afabla kaj ĝentila. Tiu klera homo regis krom Esperanto, la germanan, anglan kaj hispanan lingvojn; li ankaŭ studis la rusan kaj slavajn lingvojn, kio tre helpis lin por kontraŭstari la malamikojn de la Internacia Lingvo.

Lia morto estas grava perdo por nia movado. U.F.E. prezentas al liaj edzino, infanoj kaj tuta familio, siajn sincerajn kondolencon kaj simpation.

ooox

I.O.E. en PRIMOŜTEN (10/16-VIII-69)

De la 10-a ĝis la 16-a de aŭgusto okazis en Primoŝten la 3-a laborkonferenco de I.O.E.

Inter la konkludoj de tiu konferenco, ni ĉerpis la jenon: "konsiderante, ke turismo en nia tempo estas tereno treaktuala por la apliko de la Internacia Lingvo, kaj ke la fortostreĉoj en tiu direkto donis bonajn rezultojn, la Laborkonferenco decidas ke ankaŭ en la venonta periodo al turismo estu dediĉataj la plej grandaj atento kaj klopodoj".

FEDERATION ESPERANTISTE DU TRAVAIL liveras librojn en esperanto kaj en franca lingvo el Vjetnama D. R., Sovetunio, Germana D.R. ktp... Katalogo havebla de S-ino G. ROUX (47) MONFLANCQUIN, kontraŭ 0,60 F.per p.m. Provekzemplero de Paco, organo de MEM havebla ĉe la sama adreso kontraŭ 1,50.

(anonco)

TRILANDA KONGRESO

Trilanda (belga, nederlanda, germana) esperanto-kongreso okazos en Aachen (Germanujo) de la 27-a ĝis la 31-a de marto 1970. Tiamaniere, la tri landaj asocioj de U.E.A. internaciigas siajn kongresojn, kaj konstruas bazon por intima kunlaboro en regiona skalo.

La temo de la kongreso estos: "Lingvaj problemoj en Eŭropo". La kongresejo estos modernega konstruaĵo en agrabla kvartalo de Aachen.

De la 27/3 ĝis la 4/4/70, cetere, okazos junulara renkontiĝo de la samaj tri landoj.

Adreso: Trilanda Esperanto - Kongreso, Karl-Marx-allee 172 - AACHEN-(D.51)

MONDVASTA AGADO INTER LA SKOLTOJ

Tiuj, kiuj havas la eblecon rilati kun skoltaj grupoj, aŭ eĉ kun nur unuopaj skoltoj, trovos taŭgan materialon en la speciala lernolibro eldonita de S.E.L. Oni ankaŭ povas donaci ĝin! Prezo: 4,oo F.

VIVA DE LA GRUPAJ!

LES ANDELYS - Fine de septembro malfermiĝis kurso por progresantoj-plenkreskuloj; ĝi okazas en la knabina lernejo merkrede de la 18h30 ĝis la 19h30. Ĝin vizitas kvin homoj.

Malfermiĝis ankaŭ kurso por komencantoj; ĝi okazas en la knabina lernejo ĉiumatene de la 8.15 ĝis la 8.45; ĝin vizitas sep knabinoj 9/10 jaraj.

YVETOT - En la junia ekzamensesio sukcesis en Atesto pri Lernado du kandidatoj el Fécamp, 5 el Le Havre, 11 el Yvetot, kaj en Atesto pri Supera Lernado unu el Le Havre , kvin el Yvetot.

Ges-roj Pottier vojaĝis al Nederlando per Esperanto kaj S-ro Saunier partoprenis la U.K.-on en Helsinki.

Fine de aŭgusto, kelkaj SATestraranoj renkontis Yvetot-anojn, p o r studi la eblecon aranĝi,la kongreson de SAT-amikaro en Yvetot en 1971.

La ĝenerala kunveno de la Kulturcentro okazis la 8-an de oktobro, en la Junulara Domo.

BOURGES - La 6/10 malfermiĝis esperanto-kurso en C.E.S.Vauvert, Prof.Carrey vigle esperantigas dudek gelernantojn. Ni deziras al li bonan sukceson, ĉar tiu lernejestablo estas la unua, kiu akceptis tie organizi E°-kurson en la seminario mem.

CENTRA MONTARO - La 25/5 okazis en Bourges la federacia kongreso sub protektado de la deputito-urbestro. Pli ol cent personoj partoprenis tiun zorge preparitan kongreson. S-ro BLANC, prezidanto, bonvenigis la kongresantojn kaj la laborkunsidoj sinsekvis pro la multaj kaj interesaj raportoj kaj projektoj de la grupestroj.

Sekve de invito de S-ro MORIN, prezidanto de la klubo de Bourges, britaj kaj germanaj samideanoj ĉeestis ankaŭ la kongreson. Ni notu la ĉeeston de S-roj SCHMID (Austrujo), VRUMM (Munkeno)kaj CLAYTON(Britujo), kiuj entuziasmigis la aŭskultantaron per iliaj klaraj kaj bonhumoraj paroladoj.

U.F.E. estis reprezentita per Sro BOURDEAUX, ĝenerala sekretario; diversaj respondeculoj de aliaj federacioj ankaŭ partoprenis en tiu kongreso.

Post la kutima komuna fotaĵo sur la ŝtuparo de la Kulturdomo, S-ro ROUZE vicurbestro akceptis la partoprenantojn en granda salono de la urbodomo. Li diris sin tre kortuŝita akcepti Esperantistojn tiel nombrajn gratulis ilin pro ilia mirinda kultura ilo de interkompreniĝo, proponis helpon al la urba grupo, kaj tostis je la sano de Esperanto.

Post la komuna tagmanĝo okazis ĉarma folklordistraĵo, fare de la lernantinoj de E°-kurso en Vierzon , kies gvidantino estas Fno Gitton.Vigla parolado de BOURDEAUX kaj kantado de la "Espero" ĉesigis la duanparton de ne nur regiona kongreso, sed laŭ la principo mem de nia lingvo, Internacia Renkontiĝo.

SOLLIES - PONT - Dum l a ĝenerala kunveno de l'amikaro de la gepatroj de la Esperanto-lernantoj, oni memorigis la laboron faritan de la malfermo de la kursoj, en 1963 ĝis nun: 8 ekskursoj, 3 vojaĝoj eksterlanden (Svisujo, Aŭstrujo, Jugoslavujo), partopreno en du ekspozicioj pri infandesegnaĵoj (Jugoslavujo, Hungarujo). Ĉi-jare G-roj MATHIS akompanis unu knabinon a l Krommenie (Nederlando), kie ili restadis unu semajnon. Lumbildoj p r i tiu vojaĝo estis montrataj en la Farlède kaj Solliès-Pont en oktobro. Komence de la sama monato rekomenciĝis la kursoj en la du urbetoj.

Okaze de la venonta Kongreso en Monte-Carlo
Vizitu la mondfaman Princlandon Monako.

62a Nacia Kongreso de Esperanto kaj 2a Renkontiĝo Franca-Itala-Monaka

---

Pentekosto 1970. Vendredo la 15 an ĝis mardo la 19 an de majo 1970.

Aliĝilo

Kongresano | Samtempe aliĝas edz(in)o : S-ro/S-ino/Fr-ino

Familia nomo :
Antaùnomo :
Strato :
Urbo :
Lando :

Kotizo :	ĝis 31/12/69	ĝis 28/2/70	ĝis 10/5/70	**Pago.**
Membro de UFE :	18 F.	20 F.	25 F.	F.
Edz(in)o :	9 F.	10 F.	12,50	F.
Junul(in)o malpli ol 25 jara :	9 F.	10 F.	12,50	F.
Junul(in)o malpli ol 15 jara :	senpaga			—
Eksterlandano :	senpaga			—
Duontaga ekskurso al Vallauris : lundon, 18/5/70, posttagmeze, aùtobuso po persono			F. 14.-	F.
Tuttaga ekskurso al Tende : mardon, 19/5/70, aùtobuso po persono			F. 16.-	F.
Bankedo :			F. 25.-	F.
Donaco al la kongresa kaso :				F.
			Sumo	F.

Bonvolu sendi ĉi tiun aliĝilon al S-ro Jos DERKS, 8, bd d'Italie, Monte-Carlo, Monaco.
kaj pagi la sumon al sama adreso : per poŝtmandato, bankĉeko aù al poŝtĉekkonto n° 236-27 Marseille.
(substreku la elektitan pagmanieron)

Dato : Subskribo :

Ĉi tiun **Mendilon** la Loka Kongresa Komitato sendos al la Oficejo de la Kongresaj Servoj.
Kongrespalaco de Monte-Carlo

Prix des Chambres dans les hôtels de tourisme : taxes, service et petit déjeuner compris.

Prezoj de la Ĉambroj en turismaj hoteloj : taksoj, servado kaj matenmanĝo enkalkulitaj.

Catégorie Kategorio	Chambre à 1 lit - Unulita ĉambro sans bain-sen bano	 avec bain/douche kun bano/duŝo	Chambre à 2 pers.-Dupersona ĉambro sans bain-sen bano	 avec bain/douche kun bano/duŝo
1 étoile - 1 stelo	14.50 - 16.50	20.50 - 28.50	18.50 - 21	23.50 - 33.50
2 étoiles - 2 steloj	16 - 17	23 - 34	25 - 28	33 - 45
3 étoiles - 3 steloj	23 - 25	33 - 48	35 - 37	43 - 65
4 étoiles C-4 stelojC	27 - 33	40 - 50	—	60 - 90
4 étoiles L-4 stelojL	36	50 - 100	55	70 - 137

62e Congrès National d'Espéranto et 2e Rencontre Franco-Italo-Monégasque.
62a Nacia Kongreso de Esperanto kaj 2a Renkontiĝo Franca-Itala-Monaka.
15-19 Mai 1970 - Monte-Carlo

Demande de Logement - Peto pri Loĝado.

Nom - Nomo
(prière d'écrire très lisiblement - skribu tre legable)
Adresse exacte - Preciza adreso
(pour l'envoi du bulletin de logement qui vous sera envoyé par l'hôtel)
(por sendo de la loĝbulteno fare de la hotelo).

Veuillez réserver : Bonvolu rezervi :

........**chambre(s) à 1 lit :** 1 pers. au prix de............F. avec ou sans bain/douche-catégorie........étoile(s)
(unulita ĉambro) (je prezo de) (kun au sen bano/duŝo-kategorio Stelo(j).

........**chambre(s) à grd lit :** 2 pers. au prix de............F. avec ou sans bain/douche-catégorie........étoile(s)
(ĉambro kun granda lito)

........**chambre(s) à 2 lits :** 2 pers. au prix de............F. avec ou sans bain/douche-catégorie........étoile(s)
(dulita ĉambro)

J'arriverai le (mi alvenos la) **par rail** (fervoje) **par route** (aùte)

Le départ aura lieu le (la foriro okazos la)

Au cas où dans la catégorie demandée une chambre ne devait pas être disponible, le **Service des Congrès** est autorisé à choisir une chambre dans une catégorie voisine. Se la ĉambro en la kategorio petita ne estus disponebla, la **Kongresservo** estas permesita elekti ĉambron en apuda kategorio.

Date : dato : Signature - Subskribo :

N A C I A   K O N K U R S O

Aperos entute tri serioj da enigmoj; jen la unua. Bonvolu atente tralegi la konkursan regularon en la oktobra numero de la Revuo.

-o-o-o-o-

1-a Enigmo (14 poentoj)

Trovu la 13 sekvantajn ŝlosilvortoj:

1) parto de la korpo; 2)meblo; 3) malsano; 4) granda elefanto; 5) difekto en vesto; 6) trinkujo; 7) monato; 8) la plej bela verbo; 9)franca urgebo; 10) frukto; 11) astro; 12) tempodaŭro; 13) fiaski.

Elprenu unu literon el ĉiu vorto, kaj lasu ilin en la vico de la ŝlosilvortoj. Vi devas trovi 13-literan vorton signifanta: MEMVOLA LIMIGO DE NASKOJ.

2-a Enigmo (10 poentoj)

HORIZONTALE: 1) Ordonpovo; 2) Mar besto(r); 3) Ne scii, kion fari; movo; 4) Prahistoria epoko; pronomo; 5) Litero; interne; nur ĝi povas malpurigi(r); 6) Sola objekto; maniero prezenti aĵojn; 7) Funkcio (r) korpoparto(r); 8) Germana soldato(r) ĝi tre valoras; 9) Riverego(r); litero; altiri (r); 10) Arkitektura angulo; ĝi estas tro longa.

=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:

LES ANDELYS - Dum la someraj ferioj, tri knabinoj akompanataj de sia instruistino, S-ino Vincent, restadis du semajnojn en Grésillon. Matene, ili vizitis la kurson de S-ro Ribot; posttagmeze, ludis en la parko aù promenis.Iun vesperon, ili ekskursis al Le Lude, kie ili admiris la ravan kaj unikan spektaklon "sono kaj lumo". Por tiu vojaĝo, la Zamenhofa Kulturcentro en Les Andelys disponigis al ĉiu knabino 100-frankan stipendion. Fine de septembro rekomenciĝis la kursoj,unu por plenkreskuloj, alia por infano.

VERTIKALE: 1) Speco de kvarco; 2) malofta gaso; sufikso; 3) En vesto, nepre plenigota; bleki; 4) Interna korpoparto; 5) Litero; sufikso; antikva pastro; 6) Kiel alia; por klubo, nur unu ne sufiĉas; 7) Inerta pezo; prepozicio; 8) Kolekto; liaj gepatroj estas eùropaj, sed li ne; 9) Ili movigas ion; 10) Li studas la birdojn.

	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10
1										
2		■		■					■	
3					■				■	
4								■		
5			■				■			
6					■	■				
7				■						
8		■					■			
9				■			■			
10						■				

ooxxoooxxoooxxoooxxoooxxoooxxoooxxo

-HELPQ AL GEOGRAFOJ-

Sous l'actif secrétariat de M. R. GERARD (45 rue de Vouillé Paris XV), parait un Bulletin de Résumés Scientifiques géographiques traduits de l'Espéranto.

"Helpoj al Geografoj" peut fournir des extraits des textes dont il est présenté des résumés, et éventuellement, les textes intégraux euxmêmes ayant paru dans des revues comme "Sciencaj Studoj", "Geologio", etc...

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

Proponitaj solvoj

Teksto n°11,7

Dans une chambre confortable du deuxième étage de l' Hôtel d'Anjou, Lise était assise pensive sur le moëlleux désordre d' un grand lit complètement défait. A travers les volets, c'est avec l'ardeur sans retenue d' un matin de juillet que le grand inquisiteur détaillait effrontément les trésors secrets de ses formes charmantes qu' une chemise d'une dentelle trop fine voilait à peine. Les yeux fermés, une main à la bouche, elle semblait d'une blancheur de neige, tout comme un agneau à sa naissance. Sur le fond des draps défraîchis, elle aurait pu illustrer avec succès une réclame pour lessive avec le slogan "LAVIL lave plus blan"! Cependant pour ne rien vous cacher, elle n'était plus tout à fait vierge, au moins de corps. Rien ne se détériore plus facilement que la virginité. Comme l'allumette, elle ne peut servir qu'une fois.Ted, son amant anglais,avait frotté l'allumette dans un moment d'enthousiasme, avec d' ailleurs son entier consentement,et l'idylle parfaite avait été consommée.

Ted possédait beaucoup des qualités qui plaisent sans aucun doute à la femme la plus exigeante. Parmi ses petits défauts, faciles à calculer sur les doigts d'une main estropiée, le plus remerquable était qu' il fumait un peu trop exagérément. Avec les cendres et les bouts des cigarettes egyptiennes qu' il avait déjà immolées par le feu, on pourrait construite une imposante pyramide. Si vous avez observé des fumeurs, vous avez remarqué que les cigarettes exigent plus d'allumettes que la pipe ou le cigare. Oui, il y a bien les briquets, mais en avezvous déjà vu un fonctionner normalement? Si oui, vous avez assisté à un miracle. Ou bien à la démonstration réussie d'un vendeur habile.

Faute d' une occupation plus urgente, Ted allait chercher des allumettes. Ce matin-là, tout de suite après la douche, il se vêtit rapidement, mit son chapeau, se pencha amoureusement vers Lise, encore toute chaude dans la pénombre du lit, et lui murmura....

(extrait de "SPECIMENE" de Beaupierre, Eld. Stafeto)

Teksto n°11,8

La nokto estis preskaŭ sensufera La dozo de dormigilo havigis al li longan dormon. En la ripozinta senmoviĝo de la mateno, li sentis sin iel konfuzita. Ĉu ne eblas eviti, turni sian penson al la nealireblaj flankoj? Ĉu tio ne eblis eĉ jam hieraŭ? Sufiĉas eta klopodo, ĉu ne? eta inkliniĝo al io alia. Li ja skribis la leteron, kiun li devis skribi. Li ja pravis. Kion alian li faru? Kaj pri kio li plendas? ke okazis ĝuste tio, kion li celis? ke nenia aparta escepto, en la ĝenerala destino de la homoj, estis rezervita al li?

Li estas nur senvolulo, malkuraĝulo; jen kion necesas fari el tiuj belaj valoregaj tagoj: ilin kunmeti, kvazaŭ mezen de blanka tuko, poste nodi la kvar angulojn. Kaj finite.

Li sentis, ke ŝvelas kaj elbordiĝas el la profundaĵoj de tiu vorto "finite", superverŝo de malespero, kiel hieraŭ, ĝuste kiel hieraŭ, sed ĉi-foje da mola, pluveca, nedifinebla malespero.... Senvolulo kaj malkuraĝulo!.. Tamen ja staras ekzemplo antaŭ li. Senvolulo kaj malkuraĝulo Tiuj du vortoj havis kvazaŭan tuŝo-

sensan molecon, saporon, same kiel antaŭ unu monato la vorto morto, kaj ankaŭ ilin li turnadis en la buŝo Ili havis la guston de ploroj, d e senkarakteraj rezignacioj, de allasiĝaj rezignoj, de tuta naŭza mikso de ĉagrenoj, memkompatoj kaj iamaj feliĉoj. Post kelkaj jaroj oni ne plu distingos, ĉu tiuj feliĉaj momentoj estis realaj, aŭ esperataj, aŭ revataj; oni ne plu bone scios. Ĉio estos konfuzita. Oni ne plu povos distingi. Se tiel, kiautile distingi nun? Restas nur, ĉion lasi en ĝia mizera senrealeco. Ĉar ja tiun formon alprenus poste tiu aventuro, se okazus ia "poste", kiam li estus maljuna, se li povus fariĝi maljuna? Ha! malsaĝa, malsaĝa, malsaĝa... Jen tio, lia malespero.

(Eltiraĵo el "Augustin, ou le Maître est là" de Joseph Malègue, Edition SPES Paris).

-o-o-o-o-

K O M E N T O J

Ĉi-foje konkursis nur 7 personoj. La 1-a teksto estis vere facila. La malfacileco kuŝis en la identeco de la aŭtoro. Iom perfide, ni elektis pastiĉon de BEAUPIERRE imitantan la stilon de Raymond SCHWARTZ, kaj ni supozis, ke ĉiu atribuos ĝin al Schwartz.

Fakte nur unu persono suspektis la nomon de S. Bedaŭrinde, la tajpisto de F. E. kulpis du erarojn: atendinda anstataŭ atentinta, kaj unu pli gravan: li kripligis la tipe ŝvarcan "predikativecan suplementon" "la okulojn fermitaj" je "la okuloj fermitaj, kiu lasta formo ne povas, ekzisti en esperanto (aŭ: kun la okuloj fermitaj").

La dua teksto estis iom malfacila ĉefe pro la delikataj nuancoj de la esprimoj kaj la subtila paso de la rekta al nerekta stilo. La verkon mi elektis pro ĝia literatura beleco kaj la originaleco de la temo, eĉ por nekredantoj, kaj mi tiel esperis instigi multajn al la legado de tiu bedaŭrinde ne tre konata ĉefverko. Tamen, du konkursintoj trovis pri kiuj aŭtoro kaj verko temas.

° nebridebla: nek indomptable nek invincible; ne temas pri besto aŭ homo.

° bruloferis: iom troiga, patosa esprimo, fakte ne tiel laŭvorte tradukebla en la francan; vere ne temas pri holocauste; ankaŭ sacrifice estas troiga; maksimume: immolées par le feu (aŭ simple consummées).

Oni atentu, redoni la diversajn pasintajn tempojn, kiujn la franca utiligas en rakonto.

°
° °
°

° inertie: temas pri la matena senmoviĝo, ripozo post la pli-malpli malfacila nokto.

° inabordables: albordigeblaj estas tro preciza esprimo; simple: nealireblaj.

° il sentit gonfler.....une inondation...: inondation estas la objekta komplemento de la verbo sentit, eĉ se ambaŭ vortoj estas malproksimaj unu de la alia; necesus do: li sentis ŝveli...inundon=li sentis inundon...ŝveli; aŭ uzi la rimedon de la proponita solvo: li sentis, ke ŝvelas...

° pluvieux: malespero ne povas esti pluva, ankaŭ ne pluvema; nur pluveca.

° retournait aussi: turnadis ankaŭ ilin (same kiel li turnadis la vorton morto). Sekve la prepozicio devas stari rekte antaŭ la celata vorto:
- ankaŭ mi manĝas pomon (ne nur Petro)
- mi ankaŭ manĝas pomon (ne nur flaras ĝin)
- mi manĝas ankaŭ pomon (ne nur piron)

° résignations plates: certe ne rampaj, nek plataj, nek senpoeziaj, nek malnoblaj, sed ja senkarakteraj.

° renoncements abandonnés: ne forlasitaj estas la rezignoj; temas pri "sinallaso" de la heroo; sekve allasiĝaj (aŭ eble senreagaj).

° fou, fou, fou: li nomas sin tia; malsaĝa en sia konduto pli ol vere freneza.

Fine, oni ne kredu, ke enmeto de tiuj neologismoj, kiujn ŝpare uzas la binaj aŭtoroj, kiel ekz. svage febla, precioza (cetere kontraŭsence poltrona, tenera, kaj similaj, aldonas literaturecan tonon al tradukoj pli-malpli sukcesaj!

o

o o

o

LA LEGANTOJ ESTAS PETATAJ TRADUKI la du jenajn tekstojn, kaj sendi siajn provaĵojn, ĝis unu monato post la aperdato de la koncerna numero, al U.F.E. (T.K.) 34 rue de Chabrol, Paris IO°.

teksto n°11,9 (el esperanto en la francan) "Petolaĵo"

Iun tagon, elektante momentan foreston de la intendanto, pacema majoro, ili (a) enŝteligis min (b) en lian teretaĝan oficejon kaj sidigis min - malfacile verdire - en lian propran brakseĝon. Ili strebe aranĝis miajn antaŭajn krurojn sur lia skribotablo kaj survestis mian kranion per lia kvargalona kepo. Ŝajnas ke mi vereme samaspektis kiel iu ajn intendanto. Amuze, ĉu ne? Kiam la bonulo reeniris la ĉambron kaj min ekvidis ĉe sia tablo, surkape portante lian kepon, li ŝtoniĝis pro surprizo kaj konsterno. Mi naive ridetis.

Tuj poste li subiteiĝis tute sovaĝa. Li uragane kaptis ĉion, kio trafis en liajn manojn: la paperkorbon, la marokantabureton, unu paron da botoj ĵuse replandumitaj, unu kvinkilograman vortaregon..., kiujn li malice alpafis al mia vizaĝo. Antaŭ ol mi povis eskapi tiun torentan lavangon,mi jam ricevis la duvoluman Napoleon-kodon kaj la gipsan buston deMarŝalo Bugeaud. Renversinte la tablon, la fotelon kaj du-tri etaĝerojn superplenajn de ŝimaj dosieroj, mi saltegis tra la malfermita fenestro, kvazaŭ fuzaĵo el bazuko.Mi rekte impetis al mia hejmeca azilo,kiam tondro ekskuis la atmosferon: estis fluganta skabelo, kiu frakasis la fenestran vitraron. Pri tio mi ankoraŭ rikanas.

Noto: temas (a) pri junaj oficiroj
----- (b) pri azeno

- o - o -

Teksto n°11,10
(el la franca en esperanton)

Une théorie de la tragédie

...Et voilà. Maintenant, le ressort est bandé. Cela n' a plus qu' à se dérouler tout seul. C' est cela qui est commode dans la tragédie. On donne le petit coup de pouce pour que cela demarre, rien, un regard pendant une seconde à une fille qui passe et lève les bras dans la rue, une envie d'honneur un beau matin,au réveil....une question de trop qu'on se pose un soir...C'est tout. Après, on n'a plus qu'à laisser faire. On est tranquille; Cela roule tout seul C'est minutieux, bien huilé depuis toujours. La mort, la trahison, le désespoir sont là, tout prêts, et les éclats, les orages, et l e s silences.

....C'est propre, la tragédie. C' est reposant, c 'est sûr... Dans le drame, avec ces traîtres, avec ces méchants acharnés, cette innocence persécutée, ces vengeurs, ces terre-neuve, ces lueurs d'espoir, cela devient épouvantable de mourir, comme un accident. On aurait peut-être pu se sauver, le bon jeune homme aurait peut - être pu arriver à temps avec les gendarmes. Dans la tragédie, on est tranquille. D'abord, on est entre soi. On est tous innocents, en somme! Ce n'est pas parce qu'il y en a un qui tue et l'autre qui est tué C'est une question de distribution. Et puis surtout, c' est reposant, la tragédie, parce qu'on sait qu'il n'y a plus d'espoir.

.... Dans le drame, on se débat parce qu'on espère en sortir. C'est ignoble, c'est utilitaire. Là, c'est gratuit. C'est pour les rois. Et il n'y a plus rien à tenter, enfin!

Diferenciga j demando j:

1) kiuj autoroj verkis la ekstraktojn?

2) el kiuj verkoj venas la ekstraktoj?

Des radio-amateurs habitant l a région du Pacifique ont été très actifs ces derniers temps et des conversations d'une demi-heure en Esperanto ont lieu chaque jour. Y participent régulièrement les délégués de UEA à Honolulu et Wahiawa (Iles Hawaï) et des radio-amateurs du Mexique et de Nouvelle-Zélande, des Etats - Unis et d'Australie. P. MAGANA et V. GONZALEZ délégués d'U.E.A. à Mexico et Monterey ont fait paraître récemment trois articles dans la revue mexicaine d e radio-amateur "Onda Curta".

A la fin de chaque conversation ou contact, les participants annoncent, chacun dans sa langue, que la langue utilisée est l'Espéranto. Cela a déjà eu pour résultat que le rédacteur de la revue néo-zélandaise de radio-amateur s' est réintéressé à la Langue Internationale Esperanto.

(I.S. U.S.A. n°14)

---

oooooooooooooooooooooooooooooooooooooooo

NOTRE CARNET
===========

Madame Lucienne DURAND kaj Monsieur André BLONDEAUX informis nin pri sia geedziĝo, kiu okazis en Loctudy la 6-an de septembro 1969;

Fraŭlino Annie BARGEOT kaj S-ro M. BERNARD gefianĉiĝis la 7-an de septembro 1969;

Al tiuj geamikoj, ni sendas niajn plej korajn gratulojn k. bondezirojn.

-o-o-o-o-o-o-o-

Ni funebras la forpason de nia malnova amiko Pierre MUFFANG, profesoro pri sciencoj, el Bourg-la-Reine, la 5-an de Julio 1969,

kaj de S-ino A. ROUSSEAU, patrino de nia kasisto, la 31-an de okt.1969.

Ni prezentas al iliaj familioj nian sinceran kaj koran kondolencon.

La gejunuloj, kiuj ricevis la cirkuleron de JEFO, bonvolu rapide resendi ĝin al JEFO, 34, rue de Chabrol, Paris 10°.

Malfermo de E°-kursoj: komenciĝis nova periodo kaj multaj respondeculoj sendube gvidas kurson en siaj regionoj. La estraro de JEFO petas ilin, prezenti la junularan flankon de la movado al la junaj novuloj pri nia vivo.

Dum eta renkontiĝo en AIX, kuniĝis la instruistoj, kiuj militservos en Norda Afriko dum la venontaj jaroj. Ili interkonsentis la jenan temon: "Kiel starigi esperanto-kernon en Norda-Afriko". M. Cavelan kontaktos la estraranojn de TEJO, kiuj respondecas pri agado en arabaj landoj

TEJO kaj NEJO Komisiono, invitas vin aĉeti la novan varbbroŝuron redaktitan franclingve. Oni povas ĝin uzi laŭcele inter la homoj; ĝi kostas malmulte kaj aspektas bela. Informiĝu ĉe TEJO/NEJO, Kastelenstraat 231, AMSTERDAM/2 (Nederlando).

Internacia Seminario okazos apud rivero Lahn en (355) MARBURG, (Hesslando, Germanujo), de la 27.12.1969 ĝis la 3.1.1970. Temo "Tendencoj en la literaturo de nia epoko". Informojn vi ricevos de U. J. MORITZ, Andreasstrasse 37 (5161) MERKEN Frg.

LA KVARA SEMINARIO POR GVIDANTOJ EN VILVOORDE (Belgujo) (24-30.8.1969)

En la belega ŝtata terkultura Instituto de Vilvoorde, unu el la plej fame konataj en Eŭropo, kunvenis dum unu semajno 27 gejunuloj reprezentantoj ĉefe de TEJO, sed ankaŭ de diversaj junularaj organizaĵoj, kiel Mondfederalismo kaj Skolta Nederlanda Movado.

La kursoj estis destinitaj por spertaj kaj estontaj estraranoj de internaciaj junularaj organizaĵoj, kaj apriore la programo ŝajnis sufiĉe alloga. Tamen, malgraŭ la alta kvalifiko de niaj kursgvidantoj, mankis al tiu seminario iu necese kunordiganto. Plie, ĉar estis partoprenantoj ne-esperantistaj, ni devis uzi aparaton por la traduko (!), kaj sekve la raportoj iĝis kelkfoje laciga j!!

Spite tion, ni ŝatis ĉefe la sperton de G.C.FIGHIERA pri la organizado de Esperanto - kongresoj, kaj la raporton de S-ro BROECK, kunlaboranto en la Inform-Servo de la Eŭropaj Komunumoj en Bruselo.

Ekster la programo, la junaj respondeculoj de landaj sekcioj de TEJO sukcesis interŝanĝi utilajn vidpunktojn, kaj la agado kiu sekvos tiun kunvenon, povos igi tre pozitiva tiun kvaran seminarion.

Michel CAVELAN

xxoooxxoooxxoooxxoooxxoooxxoooxxoooxxoooxxoooxxoooxxoooxxoooxxoooxxooo

(Anonco)
Libro ESPERANTO EN KOMERCO - Raportoj de 100 firmaoj kaj organizaĵoj el 40 landoj pri spertoj per Esperanto. Ĉiu raporto en lingvoj Esperanto, angla, franca, germana, hispana. 100 paĝoj. Bonega verbilo. Prezo 3 F. (+ sendkostoj). Mendu ĉe U.F.E. (Eldono de Esperanto-Rondo en Crailsheim, Germanujo).

CHEZ LES CHEMINOTS

C'est au mois de mai dernier qu'a eu lieu le Congrès de I.F.E.F., en Avignon, réunissant plus de 500 participants de nombreux pays.

La revue "La VIE DU RAIL", dans son numéro 1202, du 13 juillet 1969, en a donné un compte rendu favorable et très détaillé.

62a FRANCA KONGRESO DE ESPERANTO
2-a Renkontiĝo Itala-Franca-Monaka
-:-:-:-:-:-:-:-
Pentekosto 1970 - 15 - 19 - Majo 70
-o-

PROVIZORA PROGRAMO

Vendredon 15-5-1970

15 h.	Malfermo de la giĉetoj kaj disdonado de la dokumentoj
19-21 h	INTERKONA VESPERO

Sabaton 16-5-1970

9 h.	Ekzamenoj (skriba parto)
11-12	SOLENA MALFERMO DE LA KONGRESO
14.30-15	Estrara Kunveno
15-16	Konsilio de U.F.E.
16-18	UNUA ĜENERALA KUNVENO
20h30	DISTRA VESPERO

Dimanĉon 17-5-1970

8h30	Kunveno de la respondeculoj de la Federacio kaj grupoj
10-12	DUA ĜENERALA KUNVENO
14h30 16h30	Vizito de la Oceanografia muzeo
17 h	Diservo
20 h	BANKEDO

Lundon 18-5-1970

8h30	Estrara kunveno
9-10	Delegitoj de U.E.A. Ekzamenoj (parola parto)
11-12	Vizito de la Ekzotika ĝardeno Akcepto de delegacio fare de la Urbestraro
14 h	Ekskurso al VALLAURIS, vizito de la Geedziĝsalonego, dekoraciita de Picasso
21 h.	Vizito de la Kazino

Mardon 19-5-1970
Tuttaga ekskurso al TENDE

La kutima aliĝilo troviĝas en la nuna numero. Vi povas aliĝi tuj per pago de la kotizo (RFE N° 259) al la C.C.P.MARSEILLE 236.27 je la nomo de M. Jos DERKS 8 Boulevard d'Italie - MONACO (Principauté).

DEK SES TAGOJ DE JUNULARA PROPAGANDO
==================================

De la 4a ĝis la 20a de oktobro la junulara sekcio de la Societo Esperantista de Liono prezentis sian ekspozicion:"Esperanto, malfermita pordo al la Mondo", en Junulardomo de la urbo. Ĝin vizitis multaj personoj kiuj petis informojn de la bonvolaj junuloj kiuj deĵoris. Centoj da flugfolioj estis disdonitaj.

La tuta materialo konsistis el pli ol 40 m2 da afiŝoj kaj paneloj, kiuj temis i. a. pri "Kial la mondo nepre bezonas Esperanton?" "Kion alportus Esperanton, se oni ĝin instruus en la lernejoj?""La organizado de UEA", "La Universalaj Kongresoj""Filatelo" "Turismo" ktp.....

Plurajn afiŝojn mem realigis la junulara sekcio. Iuj paneloj venis prunte el Romans kaj Montelimar.Fine la ĉefverkoj originalaj kaj tradukitaj de nia literaturo estis prezentitaj en tri luksaj vitrinoj.

Ĉe la inaŭguro, S-ro FRIARD, loka prezidanto de la Junulardomoj,en sia parolado, bonvenigis la ekspozicion, kaj substrekis la ligilojn inter la celoj de la Junulardomoj kaj Esperanto. S-ro MICOUD, feder. prezidanto dankis. La direkcio de la gastiganta domo varme apogis la kreadon de kurso. Dum la ekspozicio, estis aranĝitaj du publikaj prelegoj.

La 11/12 okt. okazis renkontiĝo kun partopreno de junuloj el Parizo, Thann, Drôme, ktp.. La programo konsistis el debato, varia art- kaj danc-vespero, labor-kunveno, estrarkunveno de JEFO. Fine vizito de Lyon ebligis admiri la novajn kvartalojn, paralele kun la antikvaj riĉecoj de la urbo.

Krome, dum la dek ses tagoj pluraj ĵurnaloj malfermetis siajn kolumnojn por anonci kaj raporti, kaj la loka radio dufoje parolis pri Esperanto. La logika sekvo estas malfermo de kurso (ĵaŭde 18h30-20h) sub gvidado de J.C.Caraco.

Hervé GONIN
==========

2 DEC. 1969

LES DELEGUES DE L'ASSOCIATION UNIVERSELLE D'ESPERANTO

La grande Association U.E.A. a établi à travers le monde entier un important réseau de délégués , vice-délégués et délégués spécialisés.

Répartis dans 63 pays, le nombre de ces délégués, qui jouent entre-eux et pour les membres de l'Association, le rôle de consuls, s'élève actuellement à 3.600.

Grâce à cette puissante organisation, un espérantophone n'est jamais isolé, en quelque pays qu'il se trouve. Il lui suffit de consulter l'annuaire de U.E.A. pour trouver le nom et l'adresse des délégués avec lesquels il pourra se mettre en rapport.

Le nombre des services ainsi sollicités et des correspondances échangées augmente d'une année à l'autre d' une manière très sensible, ce qui prouve le côté pratique de l'Espéranto dans tous les pays et dans toutes les couches sociales.

A l'heure actuelle, le plus grand nombre de délégués est en France; ensuite viennent l'Allemagne, l'Angleterre, la Suède, les Pays-Bas, l'Italie le Brésil, les Etats - Unis, etc...

Jean GUILLAUME
Chef-délégué pour la France

==xx==xx==xx==xx==xx==xx==xx==xx==xx==xx==xx==xx==xx==xx==xx==xx==xx==x

ENVOYEZ VOS VŒUX EN ESPERANTO

En accord avec l'U.F.E., la Société Toulousaine pour l'Espéranto vous présente une série de six cartes avec vœux de fin d'année en Espéranto.



Devant le succès obtenu l'an dernier (nous n'avons pu satisfaire tout le monde), nous vous engageons à passer rapidement vos commandes.

Les conditions sont les suivantes :
La série de 6 cartes différentes .. **9 F. franco**
2 séries : 12 cartes .... **16 F. franco**
10 séries : 60 cartes .... **70 F. franco**

Veuillez joindre votre paiement à la commande, de préférence un virement postal, au nom de la Société Toulousaine pour l'Espéranto, 3, rue Roquelaine, 31 - Toulouse, 01 — C.C.P. 1836.67.

ĈU SVEDIO INTERESAS VIN? Se JES, skribu tuj al RADIO DE SVEDIO, Dept. por Disaŭdigo eksterlanden, S/105 en STOCKHOLMO. Proponu programojn en Esperanto pri temoj, kiujn vi mem ŝatas. Instigu geamikojn skribi por atingi konstantan programon en la Internacia Lingvo. Menciu volonte ke petis vin skribi "INTER - AGADGRUPO POR ESPERANTO" en Gotenburgo.

oooooooooooooooooooooooooooooooooooo

Repagu frue vian kotizon...
vi faciligos la laboron de nia Sekretariato...
kaj ne riskos mankon en la ricevado de via revuo.

Le Gérant: André BOURDEAUX
C.P.P.P. N° 21.755

S.I.T.E.C. - Imprimeur
188, rue du faubourg saint Denis (X)